

Hermann Löns,  
Nobla ĉasaĵo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Ĉasist' libera estas mi  
En vasta ĉasadej',  
Havanta ĉaso-rajton en  
La tuta erikej'.

Laŭplaĉe ĝis la horizont'  
Ĉasadi rajtas mi  
Je cervoj, kapreoloj kaj  
Ĉasbestoj ĉiuj ĉi.

Sed kion pleje ŝatas mi  
En tuta la are',  
Nek estas kapreol' nek cerv',  
Ĉasbeto estas ne.

Ĝi estas freŝa knabinet',  
Je kiu ĉasas mi  
Ol je la cerv' kaj ĉiu best'  
Volonte multe pli.

Kaj ke ne apartenas ĝi  
Al mi, ne ĝenas min.  
Ĉasist' libera estas mi,  
Mi tamen ĉasas ĝin.

...

*Traduko de la Germana poemo "Edelwild" de HERMANN LÖNS (\*1866-08-29 – †1914-09-26) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04).*

*Arg-623-1259 (2012-10-22 18:53:30)*

*Pri la aŭtoro vidu la retejojn [http://de.wikipedia.org/wiki/Hermann\\_L%C3%B6ns](http://de.wikipedia.org/wiki/Hermann_L%C3%B6ns) kaj <http://www.loens-verband.de/>.*